



SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 5 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

2-a Kvaronjaro 1975

N° 55

AUTUNA LABORKUNSIDO

Ĝi okazos en la junulargastejo de Narbonne (kiel kutime kiam ni kunvenas en Narbonne) dimanĉon la 5-an de oktobro. Bone notu la daton ĉar dume ne aperos nova numero de "Sudfrancia Stelo".

S-ro Deligne atentigas, ke bedaŭrinde, la restoracio de la junulargastejo ne plu regule funkcias dimanĉe. Ĝi funkcias nur se sufiĉe grava grupo sufiĉe frue konigas sian intencon veni tagmanĝi. Do eble ni estos devigataj tagmanĝi aliloke. Ciu konigu, senpere al s-ro Deligne, sian intencon partopreni aŭ ne en la komuna tagmanĝo. Komprenoble se ni estos devigataj tagmanĝi en restoracio la prezo estos pli alta ol tiu kiun ni kutimis paĝi ĝis nun en Narbonne. Do, resume, kontaktu s-ron Deligne pri via partopreno en la komuna tagmanĝo kaj ni fidu je li por la aranĝo plej konvene kiel eble.

Jam de nun cerbumu pri demandoj kiujn vi deziras, ke ni pritraktu dum la laborkunsido kaj vi bonvolu ilin konigi sufiĉe frue por ilin enlistigi en la tagordon.

Nun estas 12 federaciaj estraranoj kaj konsilianoj. Ĉar en Lunel ni kreskigis la nombron de la postenoj ĝis 15 estus bone, ke ni provizu du pliajn.

Por ekvilibri la federacian konsilion proporcie al la graveco de la grupoj mi opinias, ke Montpellier kaj Narbonne devus esti pli bone reprezentataj.

Kandidatoj por la sekretaria posteno bonvolu ankaŭ sin anonci eĉ se ili ne ankoraŭ estas federaciaj konsilianoj.

Do ĝis revido en Narbonne la 5-an de oktobro. Dume mi deziras al vi agrablajn feriojn kaj kongrestagojn.

Jean Amouroux

NI ESTU OPTIMISTAJ KAJ AGEMAJ

Al la pesimistoj kaj pasivuloj kiuj opinias, ke Esperanto ne sufiĉe rapide progresas mi diras: superrigardu la nunan staton de Esperanto en la mondo kaj vi vidos ke Esperanto progresas konstante. Ĉiu el ni, je sia nivelo, povas kaj devas fari ion por akceli ĝian progresadon.

Ja Esperanto progresas eĉ se, laŭŝajne, la atingitaj rezultoj ne estas ĉiam okulfrapaj. Ofte okazas, ke esperantistoj esperas tuj tujan sukceson al siaj klopodoj kaj se rapida sukceso ne kronas ties klopodojn amareco, seniluziiĝo aŭ pesimismo sekvas. Tio estas eraro.

Kiel ĉiuj gravaj ideoj la nia progresas malrapide sed senhalte. La monda lingva problemo estas afero kiu tute ne povas solviĝi en la intertempo de kelkaj generacioj sed estas vere, ke Esperanto trovis kaj havas sian bonfaran lokon en la nuna monda evoluo.

Mi ne kapablas filozofiumi kaj raporti pri la temo. Mi tute simple volas reliefigi kiom necesa kaj utila estas nia unuopa aŭ grupa rolo.

Laŭ diversaj gazetfontoj jen kelkaj faktoj kiuj meritas, ke ĉiu el ni cerbumu kaj reagu. Skribi kaj sendi leteron kostas malmulte. Tamen letero adiciita al multaj aliaj povas tre forte influi decidon kaj doni rezultojn eble nefacile mezureblajn dekomence sed kiuj povas esti bazo de pli postaj pli gravaj atingoj. Do estas formo de agado kiun ni tute ne devas neglekti.

1° — dum la dua ordinara sesio de la Parlamento la deputitoj diskutos leĝoprojekton kiu celas agnoskigi Esperanton kiel studlingvon en la duagradaj ekzamenoj. Estas tre grava afero pri kiu la grupestroj de nia federacio ricevis cirkuleron de U. F. E. petante, ke ankaŭ la parlamenta diskuto ni rilatu kun ĉiutendencaj deputitoj de nia departemento klarigante pri Esperanto se necese kaj petante ilian favoran voĉdonon.

Ni ne preterlasu tiun gravan aferon.

2° — la 5-an de majo la 3-a kanalo de la televido programis, por la unua fojo naciskale, dekkvinminutan elsendon pri Esperanto. Ĉu vi gratulis U. F. E. (grave, statistike, por plua agado tiudirekten), la direkcion de la 3-a kanalo de la televido samtempe petante pliajn elsendojn pri Esperanto kaj Esperanto-kurson?

3° — el "Franca Esperantisto" n-ro 292, p. 37 laŭ artikolo de s-ro Janton: "La projekto pri eduksisistemo de nia ministro, s-ro Haby, ĵus aperis sub titolo 'Propositions pour une modernisation du système éducatif'. Ĝi estas havebla en ĝiuj lernejoj kaj en kelkaj librejoj. Car la ministro mem invitas la legantojn eldiri sian opinion, estus konsilinde, ke la esperantistoj skribu, persone aŭ grupe, al li por postuli la enkondukon de Esperanto kiel dua lingvo en ĉiujn lernejojn, kie tio estas farebla".

4° — en la aprila numero de "Radio Vaticana" (ĉiumonata revuo de la vatikana radio) estis represita artikoleto de itala esperantisto kiu pledas por la uzo de Esperanto por la vatikanaj radiodissendoj. Laŭdire la represado de ĉi artikolo estas kvazaŭ "sondbalono" por analizi ties eĥon kaj eventuale ankaŭ programi en Esperanto. Do interesa kaj grava afero. Skribante, franclingve, al "Radio Vaticana - Cité du Vatican" oni povas inciti la vatikanan radion elsendi ankaŭ en Esperanto surbaze de du ĉefaj kriterioj:

— la diverslandaj esperantistaj katolikoj aŭskultus la elsendojn des pli entuziasme, ke ili estus en, por ili, komuna kaj kara lingvo.

diverslandaj esperantistoj, nekatolikaj, ankaŭ certe kaptus la elsendojn pro la simpla fakto, ke ili estos en Esperanto. ktp., ktp....

Mi citis nur kelkajn priatentindajn faktojn. Aliaj, same gravaj, ne mankas — vidu la ĉi supre nomitan numeron de "Franca Esperantisto". Ni ne neglektu nenion ĉar ĉiu, en si mem, estas ero de la longa ĉeno kiu kondukas al la celo. La finon de la ĉeno ni ankoraŭ ne vidas. Tamen ni povas jam vidi la multajn kaj forte ligitajn ĉenerojn kaj tio devas esti por ni fonto de fido, espero kaj stimulo por senlace daŭrigi la agadon eĉ se, kelkfoje, ĝi restas sendanka. Ni plene konsciu, ke la agado de ĉiuj, senescepte, estas utila kaj nepre necesa.

Jean Amouroux

JUDA TRANSPORTO

Pro tia amasa mortado saĝas, ke la S.S. -Hauptcharführer fine malkvietiĝas. Estas certe, ĉar lia koro sangas vidante ĉiujn tiujn kompatindajn kadavrojn amasigantajn en la kesto, sed eble ĉar li ektimas esti devigota, unu tagon aŭ alian, ŝuldi konton al iu.

Sendube pro tio, unu matenon de la jarkomenciĝo, du S.S. -oficiroj, inspektoraspektaj, eniras enketcele nian barakon. Kelkaj indignaj ekkrioj de unu el ili, nin bone antaŭsentigas pri la sekvoj de tiu enketo. "Das ist ein scheiss Lager." (Jen merda kampo.), aŭdas ni. Kaj estas S.S. kiu tiel parolas....

Du aŭ tri tagojn poste, oni al mi ordonas, ke mi pretigu ĉiujn malsanulojn de la malsanulejo por transporto, kaj ke mi al ili aldonu la plej marasmitajn de la (1) "muzulmanoj" ĝis maksimumo de 200 homoj.

Ne estos facile tiun transporton konsistigi. Se la francoj kaj la rusoj volonte akceptas la kontrolon, ĉar ili estas konvinkitaj, ke ne ekzistas aliloke pli malbonaj vivkondiĉoj, la judoj male utiligas ĉiajn artifikaĵojn por eskapi de ĝi. La vorto transporto ilin tute terurigas, ili fariĝas palegaj kaj tremaj. Ili ja estas absolute certaj, kaj nenia argumentado povas ilin deteni de tiu opinio, ke transporto de malsanuloj devige kaj nepre alveturas al gasĉambroj kaj krematorioj.

Tial obstinege ruze, kaj kun senespera energio, ili penas sin forsavi de Jup, la blokĉefo, kiu ilin ĉassekvas en ĉiujn direktojn, en kiuj ilin sin kaŝas. Ne plu estas unu sola el ili, kiu sin diras malsana. La samaj kiuj kutimas veni ĉiuvespere, post la labortago, en senfina vico peti de mi, ke mi ilin prezentu al la SDG por ke ĉi tiu ilin laborliberigu, kiuj tute certe estus tute pravigita pro iliaj kruroj tiel edemŝvelintaj, ke ili ne plu kapablas marŝi, nun kuras antaŭ ni kun lasta energia ekskuiĝo por iluziigi, ke ili ankoraŭ ion kapablas.

Sed Jup ilin ĵetas teren manpuŝe por publike pruvi ilian elĉerpigon.

(1) Muzulmanoj: en ĉiuj Kampoj estis tiel nomitaj la elĉerpitaj punlaboruloj.

=====

Ni publikigas ĉi-supre malgrandan eltiraĵon de la verko de nia samideano D-ro G. Salan, pri kiu ni aludis en la n-ro 54 de nia regiona gazeto.

La prilaboro de tiu verko bone progresas, kaj la aŭtoro firme esperas, ke ĝi estos eldonita venontan oktobron.

AL LA AKTIVAJ GESAMIDEANOJ

Post jaraj klopodoj, s-ro Rougetet sukcesis interesigi parlamentanojn al nia afero kaj pasintan semajnon li estis informita pri propono de leĝo favora al Esperanto.

Antaŭ ol libertempi li sendis letercirkuleron al 50 deputitoj, 40 senatanoj kaj 5 eksministroj de diversaj partioj kiuj manifestis simpatian al nia lingvo.

Hodiaŭ ni ĵus ricevis oficialan cirkuleron pri tio kaj tuj deziras informi vin, esperante, ke vi povos influu unue deputitojn – ĉu rekte – ĉu pere de samideanoj – ĉu dank'al simpatiantoj. Estus bone havi renkonton kun la parlamentano, sed oni ankaŭ povas agi per telefono aŭ korespondado.

Jen la oficiala teksto:

N° 1667 ASSEMBLEE NATIONALE Seconde Session Ordinaire de 1974 - 1975 PROPOSITION DE LOI

tendant à inclure la langue internationale Espéranto dans l'enseignement secondaire comme langue facultative.

Présentée par MM. MEXANDEAU, BAYOU, BASTIDE, FRECHE, SERES, VIVIEN et les membres du groupe du Parti socialiste et des Radicaux de gauche et 2 apparentés, MM. CESAIRE et JALTON. (Entute 107 deputitoj)

Sekvas 2 paĝoj kaj duono: Exposé des Motifs kaj jen estas la teksto de la propono:

Art. premier: L'étude de la langue internationale nommée "Espéranto" est admise comme matière facultative dans tous les programmes de l'enseignement secondaire.

Art. deuxième: Aux examens comportant une ou plusieurs épreuves de langues étrangères, la langue internationale "Espéranto" est ajoutée à la liste des langues étrangères sur lesquelles peuvent porter ces épreuves.

Art. troisième: L'enseignement optionnel de l'Espéranto se fera progressivement dans les Etablissements publics d'Enseignement de l'Etat; il aura lieu chaque fois qu'il sera demandé et qu'il existera un professeur compétent.

Art. quatrième: Les épreuves d'examen seront introduites chaque fois que le Jury pourra s'adjoindre un examinateur compétent.

Art. cinquième: Pour l'enseignement et pour les examens, les candidats bénéficieront des mêmes moyens et des mêmes avantages accordés à ceux qui apprennent des langues étrangères.

Art. sixième: La formation des professeurs sera réalisée par l'organisation de cours et de stages fonctionnant dans le cadre de l'Enseignement Supérieur qui délivrera les diplômes témoignant de la compétence des professeurs et examinateurs. La période transitoire sera aménagée par voie réglementaire.

Art. septième: titre transitoire, pendant la période de démarrage, le Ministère de l'Education pourra consulter l'organisation privée, dénommée "Institut Français d'Espéranto", qui, jusqu'à ce jour, organisait les examens et délivrait les diplômes.

Vi devas kompreni, ke estas por ni grava ŝanco kaj ni esperas, ke ni sukcesos efike mobilizi niajn fortojn por atingi sukceson. – Bonvolu afable raporti al ni pri via agado.

LA ESTRARO DE U. F. E.

K R U C V O R T O J

Horizontale



- 1- La renversita sistemo kiu plantas.
- 7- Biblia muzikilo
- 14- Sistemo de triparteco (R).
- 16- Tirstango, la atenano ŝekspira.
- 17- La latina kupidino.
- 19- Naŭcent romianoj.
- 20- Glaci-ŝrankoj.
- 24- Lui alojoj estas tiaj.
- 27+29- Vert. + 3-vert. Pacista organizaĵo.
- 29- Maŭta ŝvelaĵo.
- 30- Jesuitaj literoj.
- 31- Loga galo? Roba birdo!
- 32- Necesa por ekspertizi! (R)
- 35- Nomo, ne nia, nek vira.
- 37- En espero nova promenejo.
- 39- Gramatika formo.
- 40- Inda inda nomo
- 43- Nek kala nek laka, korno akra.
- 44- Maltrovo
- 46- Liaj ŝafoj estas homoj.
- 49- Lokomalseka sed serĝata.
- 50- Detie oni prelegas.
- 51- "Brilu, brilu, eta...."
- 52+22 Vert. Sporade, frakcie el....
- 53- Metaloj, ingredienco de bronzo.
- 54- Eventoj de la dramo.
- 61- Rabeza rolulo.
- 62- Senplaga metriko
- 63- La centro de la spertulo.
- 64- Itala urbo.
- 65- Laŭtega.
- 69- Manĝebla globo.
- 73- Spiritaj vigligoj.
- 74- Persaj versoj.

1	2	3	4	5	6		7	8	9	10	11	12	13	
14							15		16					
					17	18					19			
20	21		22	23				24			25			26
27								28			29			
								30			31			
32	33		34				35	36			37			38
39						40			41					
				42		43					44		45	
46	47		48				49				50			
	51						52							
53							54		55	56	57	58	59	60
61									62					
	63						64							
	65		66	67	68				69	70	71		72	
73									74					

Geoffrey King (Anglo) 1975

Vertikale



- 1- Forne kuiri
- 2- La brita reĝino
- 3- Vidu 27 horiz.
- 4- Vi kaj mi revenas
- 5- Sudafriko.
- 6- Sekvanto.
- 8- Provizoj.
- 9- Balaj sen dancado.
- 10- Literatura mondo.
- 11- La komenco de 65 horiz.
- 12- Voltaire kaj Rousseau estis inter ili.
- 13- Dickens verkis plidunecian.
- 15- Aŭtoro de la "lernolibro de la vivo"
- 18- Rilata al Mortmaro gento.
- 21- La realaj nocioj komenciĝas per ili.
- 22- Vidu 52 horizontale.
- 23- La urbo de Abrahamo.
- 25- Malabundo.
- 26- Jodilo.
- 28- Rilata al la filode Abrahamo
- 31- Necesajo por spiri
- 32- Laborgrupo.
- 33- Duono de la duopo.
- 36- Per arta ŝtofo
- 38- La celo de la diktaturoj, laŭdire.
- 41- Faŝistino
- 42- Speco de refaldo.
- 44- Itala rivero.
- 45- Du latinaj landoj.
- 47- Diino.
- 48- Ne lasu fali.
- 52- Rezisto.
- 53- Socialisma partio.
- 55- Manĝebla globo
- 56- Varmklimata arbo.
- 57- Meze en la stepoj.
- 58- Mi trinkas vin hispane! (R)
- 59- Inverso de la 11 Vert.
- 60- Palindromo.
- 66+67+68 = ne esti nano.
- 70+71+72 = ne-pleba.

* - (R) nur radiko

* - Solvo de la antaŭa problemo


Solvo de
 la krucvortoj
 aperinta sur la N.º 54

T	E	L	E	R	O		A	S	P	I	R
U	N	U		A	P	E	R	T	U	R	O
A	T		A	D	A	P	T	I	L	O	
L	U	B	R	I	K	I		M	O	N	O
E	Z	O	K	O		T	I	U		I	R
T	I	N	O		M	E	R	L	O		T
O	A	Z		M	E	T	I	I	S	T	O
	S	O	V	E	T	O		L		O	P
S	M		A	M	I		L	O	N	G	E
P	I		P	O	L	O			M	O	D
I	G	N	O	R	E	B	L	A			
C	I	T	R	O	N		O	V	A	L	O

5 minutoj da intervalo




Vi nervozigas min forgesante tiel ofte vian tukon.



Nun vekigu bone kaj rigardu !



Mi estas laca elpensi menuojn skuu la breton kaj donu al mi kion falos .



Mi estas viktimo de jureraro .




SEN VORTOJ .



Do, vi iros aŭ ne ?

R. F. F.



Itala renkontiĝo al Nîmeso

Pro spacomanko en nia bulteno, nur nun eblas aperigi ĉi tiun artikolon.

Antaŭ ol komenci kian ajn raporton pri la lasta renkontiĝo kun la italaj esperantistoj, necesas tutunue danki la abundan partoprenon de la membroj de nia nimesa grupo al tiu aranĝo, malgraŭ ke oni tuj rimarkis la mankon de niaj geprezidantoj (bedaŭrinde neoportuna malsano kaptis ilin lastmomente).

Mi bone scias kaj komprenas, kiom da ne indiferentaj problemoj estiĝas por okaziĝi decan aranĝon: kunigi la membrojn, ilin interesigi, propagandi en nia urbo, ĉio fariĝas tre streĉa laboro, ĉar la nimesanoj pli volonte partoprenas kiel izoluloj al kongreso en malproksima lando anstataŭ trankvile resti en sia urbo, aranĝi E-kunvenon.

Tamen hodiaŭ mi estas sufiĉe optimista, ĉar eĉ se nia movado stagnas, oni devas tamen rekoni, ke neniu el la malnovaj grupanoj perdiĝas, ofte ni havas novbakitajn membrojn, sed bedaŭrinde ili estas nur portempaj, do se neniu aŭ apenaŭ iu novulo ĉeestas niajn kunvenojn, aliflanke la malnovaj restas fidelaj, tion oni devas konsideri kiel pozitivajo por nia grupo.

Revenante al internacia renkontiĝo, krom la nimesanoj, venis neatendite sed aparte bonvenaj, gesinjoroj Reaoud akompanitaj de s-ro Pelletier, kaj la izolita membro, s-ro Angevin el Le Cailar.

Agrabla surprizo de s-ro Lentaigne el Montpellier okazis dum la tagmanĝo, li havis interalie, gravan komision de sia grupo por transdoni monan helpon al la fondusa internacia filologia infanlernejo de Genovo (Italio).

Laŭ la planoj antaŭfiksitaj, ni akceptis la italan karavanon en Avignon, la sabaton posttagmeze, estis 35 partoprenantoj; kun la respondeculo de la karavano ni finaranĝis la detalojn por ilia restado en Provenca regiono. Estis vizito al la Papa palaco kaj al ekspozicio de pentraĵoj de Picasso, al Ponto de Gard. En la dimanĉo ili tagmanĝis en Nîmes, sekvis vizito tra la historiaj monumentoj de la urbo kun akompano de kelkaj el niaj membroj. D-ro Salan konatiĝis kun kelkaj esperantistoj el Verona, urbo ĝemeligita kun Nîmes, kaj preparolis la eblecon por eventuala esperanta ĝemeliĝo en la venonta jaro! Dum la tagmanĝo estis al ĉiuj disdonataj flugfolioj en la franca kaj Esperanto pri la departemento de Gard.

En la sama tago aperis en la ĵurnalo "Midi Libre" artikolo anoncanta la franc-italan renkonton de Nîmes, kio kontribuis por plej bone oficialigi la ĉarman Esperantotagon.


El tiu renkontiĝo mi eltiras, ke estus dezirinde, ke ni pli ofte renkontiĝu por praktiki nian lingvon kaj por doni pli da graveco al internaciaj interrilatoj.

Roberto Frus

ESPERANTO EN LICEOJ

Junaj lernantoj de liceo "Arago" en Perpignan vizitis s-ron Llech-Walter por peti prelegon pri Esperanto. Tiuj junaj lernantoj antaŭvidas la ĉeeston de 200 aŭskultantoj kaj malfermo de kursoj.

Rimarkinda fakto estas, ke ĉi jare la gesto de la liceanoj estis spontana; dum pasintjare ĝi okazis post alvoko de s-ro Llech-Walter al la estroj de la liceoj, kiuj organizis prelegojn pri Esperanto.



AGRABLA SURPRIZO

VIVO DE LA GRUPOJ



Preskaŭ neatendite - li fakte sin anoncis nur du tagojn antaŭa -
venis al ni, samideano Whollet Clément el Herstal (Belgio).

Magistratano en tiu ĉi urbo - ĝemelita kun Alès - li partoprenis
en la delegacio invitita de nia urbestro, okaze de la soleno (de la
soleno) de la deka datreveno de la nuna urbkonsilio.

Bedaŭrinde pro la oficialaj aranĝoj, neblis al nia amiko dediĉi
multe da tempo al nia grupo. Tamen, sabaton tagmeze (la 16an de marto)
kelkaj el niaj grupanoj povis longe babili kun li kaj tiel montri al
la ĉeestantoj ke Esperanto estas vivanta lingvo. Domaĝe tamen, ke
Herstel'anoj estas franclingvanoj!

FILATELA ANGULO

Okaze de la 48-a kongreso de S. A. T. estos uzataj porokazaj koverto kaj
poŝtostampo en la periodo de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto en la kongres-
ejo "Op Gouden Wieken", Hago, Nederlando.

Ne-vizitantoj de la kongreso povos akiri stampon kaj koverton sendante 2
internaciajn respondkuponojn, antaŭ la 22-a de julio, al la jena adreso:

G. v. d. Horst, Hengelolaan 1158a, Den Haag-2033, Nederlando.

Ĉi informon oni bonvolu diskonigi plej larĝe kiel eble per filatelaj revuoj
(post traduko en la francan), Esperanto-bultenoj kaj revuoj, ktp.
(sciigis s-ro Kuypers, Lombardkade 85-b, Rotterdam-3000, Nederlando, sekre-
tario de la 48-a kongreso de S. A. T.

Ankaŭ la 60-a Universala Kongreso de Esperanto kiu okazos en Kopenhago,
de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto havos porokazajn koverton kaj poŝt-
stampon (laŭ "Heroldo de Esperanto" n-ro 10 - 5 junio 1975).

ESPERANTO EN LINGVO

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 2^{me} Trimestre 1975

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes